

ESPERANTO

Esperanto estas lingvo internacia, oni ĝin parolas en 120 landoj tra la mondo.

En 1887 ZAMENHOF kreis Esperanton laŭ ideoj logikaj trovitaj en aliaj lingvoj, kun tri punktoj:

1. Ke la lingvo estu rapide lernebla.
2. Ke oni uzu la lingvon por la komunikado kun personoj el aliaj landoj.
3. Ke oni reklamu pri la lingvo ĉirkaŭ ni, por ke multe da homoj sciu, ke ĝi ekzistas.

HODIAŬ

Centoj da personoj publikigas mesaĝojn kaj videojn ĉe JuTubo kaj Tvitero, en Esperanto.

En interreto Guglo kaj Fejsbuko havas interfacon en Esperanto.

Roloj en la TV-serioj *Danny Phantom* kaj *Red Dwarf* parolas Esperanton.

La video-ludoj *Final Fantasy XI*, *Morrowind*, *Oblivion*, *Skyrim* kaj *Minecraft* havas kelkajn partojn skribitajn en Esperanto.

SUBTENOJ

Ekzemploj de personoj, kiuj uzis Esperanton: CHARLIE CHAPLIN, MICHAEL JACKSON, JEAN-PAUL II.

Personoj subtenis Esperanton: la verkisto JULES VERNE, la sciencisto ALBERT EINSTEIN, la prezidento FRANÇOIS MITTERRAND, la politikisto ROBERT FRANCIS KENNEDY, UMBERTO ECO, PELÉ.

Organizacioj subtenas Esperanton: la Konsilio de Eŭropo, la Organizaĵo de Nacioj Unuiĝintaj, Unesko kaj kelkaj universitatoj tra la mondo.

HISTORIO

Ekde 1905 la gramatiko de Esperanto estas fiksa per la libro *Fundamento de Esperanto*.

Dum la 20-a jarcento la lingvo estis komence bone uzita, sed pro la kolonioj francaj kaj anglaj, kaj pro la du mond-militoj, ĝi estis iom malpli uzita poste.

Hodiaŭ Esperanto estas la lingvo de neniuj ŝtatoj en la mondo ĉar la celo estas, ke personoj havu lingvon komunan neŭtralan kaj ke ili konservu sian propran lingvon.